

### Al Rim. III

Necesas aldoni ke ankaŭ **ISO** fiksas transliterigon de la cirilaj literoj, nome en la Rekomendo ISO/R n-ro 9, krome de la arabaj literoj en ISO/R n-ro 233 kaj de la hebrea literoj en ISO/R n-ro 259.

### Al Ĉapitroj III-V

La alfabeto envicigo de Esperantaj vortoj laŭ la komenclitero de la radiko estas nepre konvena, se la uzanto de la vortaro scipovas Esperanton. Tamen oni ja devas konsideri, ke terminoj estas ofte serĉataj de tiaj personoj kiuj ne regas la koncernan lingvon. Do oni ne rajtas supozi ke tiaj personoj scias, kiu vort-elemento en Esperanto estas prefikso aŭ radiko. Pro tio oni devas konstati ke por plurlingvaj teknikaj vortaroj estas pli oportune, ke decida por la sinsekvo estas la komenclitero de la unua vorto de termino, kiel okazis en la **Brulŝirma Vortaro**. Tamen en unulingvaj Esp. — fakvortaroj oni nepre apliku la envicigmanieron uzitan ekz-e en la **PV** kaj indikitan en la **LABOR-PLANC**.

### Al Ĉapitro VI

Necesas aldoni ke la de la **Germana Normiga Komisiono (DNA)** en 1964. eldonita »Bauwörterbuch« (Internacia Konstru-Vortaro) reprezentis nur malneton, kaj ke DNA tutkompreneble sekvas la rekomendojn de **ISO** eldonante definitivajn terminarojn. En ĉi tiu kunligiteco eĉ la eminenta normigfakulo **D-ro Wüster** diras, ke neniakaze **normo** iun devigas, fari alion ol li taksas ĝusta.

### Al Paĝo 17 (S. R. 15, n-ro 1—2)

En la alineo pri la aŭtoritataj signoj okazis eraro. Ni do rekomendas marki per aŭtoritata signo **terminojn** (ne nur neologismojn). Se la termino (nocinomo) devenas de **malneto (projekto)**, tiam validas jena aŭtoritata signo: **pISAE**. Sed pri terminoj devenantaj de **rekomendoj** kaj **normoj**, kiel aŭtoritata signo validas: **ISAE**.

### Al Paĝo 20 sube (S. R. 15, n-ro 1—2)

Ni devas aldoni, ke la plurlingvaj **Ilustritaj Teknikaj Vortaroj** de **A. Schlomann** ne estas elĉerpitaj, sed plejparte denove prezentitaj kaj haveblaj ĉe la Eldonejo (Verlag) **R. Oldenbourg**, Rosenheimer Str. 145, 8 München 8, Germanujo (BRD).

R. H.

## LINGVAJ DISKUTOJ KELKAJ LINGVAJ PROBLEMOJ

N-roj 59/60 de *Scienca Revuo* (Majo 1965) pritraktas du lingvajn problemojn. En artikolo titolita »La gvidata evoluo de Esperanto« K. G. Linton (Aŭstralio) pritraktas la temon de la vortkarakteroj kaj skizas formulon por eltrovi la vortkarakteron. Tiu ĉi studaĵo estas bonega kaj certe meritas pli ĝeneralan diskonigon. Sed jenaj ĝustigoj ŝajnas al mi necesaj. Adjektiva radiko, kiam uzata kiel verbo, ne signifas: »tari **agon** karakterizatan de la eco de io -a« Ni ne pretervidu ke laŭsignife ekzistas du grandaj grupoj de verboj: tiuj de ago kaj tiuj de stato. Esti, resti, stari, sidi, kuŝi estas verboj de stato, ne de ago. El adjektivaj radikoj fariĝas verboj de stato, ne de ago, la adjektivo mem ja esprimas staton. Ni devas do diri: »adjektiva radiko kiam uzata kiel verbo, signifas: »esti en stato karakterizata de la eco de io -a«. Sekve **kuraĝi**, jes, signifas: esti kuraĝa, t. e. esti en stato karakterizata de kuraĝeco, alivorte »havi kuraĝon (havi kuraĝ-econ). Pri **vortpureco** ŝajnas al mi, ke ni devas esti iom singardaj por fabriki tro haste regulon. Ekz. »dumpingo« venis al Esperanto kiel internacia vorto uzata kiel kun la angla sufikso ing. Ĝi ne identas kun ĉiuj signifoj de la angla vorto **dumping**, sed laŭ PV kaj laŭ internacia uzo ĝi signifas nur »vendo de iu produkto je pli malalta prezo eksterlanden ol enlande«. Simile **mitingo** ne identas kun ĉiuj signifoj de la angla **meeting** kaj tial ne povas fariĝi simple **mito**. Pri la difino de **mitingo** vidu PV. Ĉirilate mi dezirus averti anglalingvanojn ne doni al tiaj angladevenaj vortoj ĉiujn nuancojn, kiujn ili kutimas doni en sia nacia lingvo. Ekz. en la artikolo »Kontribuo al logika scienca Terminaro« S-ro Maurice Lewin, Britujo uzas la vorton **rekordi** en la senco de **registri**. **Rekordo** en Esp-o tamen estas nur »plej supera oficiale konstatita atingo de konkursanto en sporto (aŭ en alia aktiveco)«, ĉar nur en tiu senco la vorto fariĝis internacia. Pripensu kio fariĝus el tiu vorto, se la hispanoj aldonus ankoraŭ ĝian hispanan signifon: **rememoro**.

Per kelkaj vortoj mi dezirus ankoraŭ tuŝi la artikolon ĵus cititan de s-ro M. Lewin. Ĝi ŝajnas tre bona kontribuo al logika scienca terminaro. Sed ankaŭ ĉi tie mi kredas ke ni devas esti tre singardaj kontraŭ starigo de tro rigidaj reguloj. Ni certe povas akcepti kiel sciencajn afiksojn: **log**, **metr**, **graf**, **skop**, sed pro tio ni ne devus ŝanĝi vortojn jam internacie uzatajn, en kiuj ĉi vorteroj ricevis iom diferencon sencon, ekz. teologo, monologo, dialogo, same kiel ni ankaŭ ne ŝanĝas vortojn kiel **automobilo**, **fusilo**, **vitamino**, kiuj ŝajne entenas Esp-an sufikson.

Fine ŝajnas al mi konvene konsideri iom la enkondukon de novaj prepozicioj. Esp-o ĉiam posedis la rimedon pliampleksigi kaj pli-



nuanci la ekzistantan prepoziciaron per kunmetoj, kiel ekz. el-sub, de-sur, el-inter, ek-de, dis-de, ek-el. Simile al tiaj kunmetoj rolas prepoziciaj esprimoj kiel »flanke de« (iom arkaismiĝinta, kial?), »fare de«, »kaŭze de«, »cele al«, »dank'al«, »spite al« (aŭ analogie al dank'al: spit'al). Laŭ »dank'al« oni komencis uzi »far'de«, kiun esprimon oni fine mallongigis ĝis **far**. Rimarkeblas ke speciale en nia scienca literaturo tiu **far** havas multajn adeptojn, supozeble pro ĝia simileco al la franca **par** (kun ekvivalentoj en aliaj eŭropaj lingvoj). Oni argumentas ke, se ni rajtas fari el prepozicio verbon (peri, antaŭi, ĉirkaŭi), inverse oni ankaŭ rajtas fari el verbo (kaj el aliaj radikoj) prepoziciojn. Oni eĉ reliefigis la evolueblojn rezultantajn el tio: amason da prepozicioj kiel: kaŭz, cel, rond kaj eĉ verk, skrib, lud, rol.

Jen kelkaj argumentoj pripensindaj kaj pripesindaj kontraŭ la familio de la far-prepozicioj. La plimulto de la Esp-aj radikoj ne estas kompletaj vortoj, sed postulas kompletigon per gramatikaj finaĵoj. Nur la substantiva finaĵo estas en poezio kaj escepte en alia okazo ellasebla. Sekve **far** estus nenio alia ol **faro** (far'). Ekzistas kelkaj malmultaj fundamentaj vortoj ne bezonantaj kompletigon per gramatika finaĵo: ili estas prepozicioj, adverboj, konjunkcioj kaj similaj elementaj vortoj. Nu, konkludi ke per uzo de la nura radiko ni ricevas pli multe da tiaj elementaj vortoj, do pli da prepozicioj, adverboj, konjunkcioj, tio signifus enkonduki regulon de matematika renverseblo. Ni irus la vojon de Ido. Aliflanke, laŭ kia logiko ekz. la esprimo »akcepto far sinjoro A.« devas havi la sencon: akcepto fare **de** kaj ne: fare **al**...? Finfine, esprimoj kiel »konstruita far fizikistoj«, »eltrovita far esploristoj« (vidu Scienca Revuo No. 61) pekas kontraŭ la Fundamento, kiu klare preskribas ke la prepozicio indikanta la aganton post pasivo estas: **de**.

E. Sonnenfeld

#### KELKAJ KOREKTOJ KAJ KOMENTOJ

pri artikoloj aperintaj en S. R. 15, n-ro 59—60

(1) KONTRIBUO AL LOGIKA SCIENCA TERMINARO (Maurice Lewin): Sur p. 74 sub 3. **-gramo** kaj sub 5. **Bio-** la verkinto kvarfoje erare uzis la radikon »rekord« anstataŭ la ĝusta »registr«. La anglajn vortojn »to record, recorder ktp« oni ne traduku per la esperanta »rekord«, ĉar oni ne konfuzu »registri« kaj »rekordi«! En la artikolo do devas teksti jene: **registraĵo, registra folio, registrilo de vivfenomenoj, registra folio de biografo**.

(2) PROBLEMOJ DE LA ESTINGANTA PRESKRIPTO EN RILATO AL LA BULGARA CIVILA JURO (L. Mihajlov), p. 79—86:

La vorto PRESKRIPTO ja troviĝas en PV kaj Grand Dictionnaire (G. Waringhien); tamen en la artikolo de M., en kelka kunteksto mi preferus eviti la fremdvorton kaj uzi la esperantajn terminojn »**rajto-perdiĝo**« (Christaller) aŭ »**validlimo**« (Christaller).

R. Haferkorn

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio  
Esperantista, Vol. 16. n-ro 3/4 (1965)

621.41 : 629.179.1

## LADBLOK-KAJ LAD-EKZAMENOJ PER ULTRASONO EN DANUBA FERUZINO

József Tar (Hungario)

La sturma ĉenreakcia ritmo de evoluo estas karakteriza nuntempe sur la kampo de scienco kaj tekniko. La konstruistoj, realigistoj preskaŭ ĉiutage surprizas la mondon per iu maŝino aŭ kuraĝa meĥanismo superanta ĉiun homan imagon. La inĝenieroj kalkulas pri altkvalitaj materialoj ĉe planado kaj fabrikado de maŝinoj kaj meĥanismoj kun alta laborprodukto kaj fidiindeco. La metalurgio havas ne malgrandajn taskojn por kontentigi la severajn kvalitajn kondiĉojn. Ne nur la metalurgio kaj tekniko, sed ankaŭ la material-ekzameno je devas disvolviĝi konforme al la evoluo. Hodiaŭ en iu metalurgia kombinumo oni ne plu eblas kontentigi altnivelajn kondiĉojn sen material-ekzameno, disponanta pri famkonataj kaj modernaj instrumentoj.

Enkonduko de ultrasonaj material-ekzamenaj procedoj en la industrion, krome la rapida perfektigo de l' ultrasonajaparatoj dum la lastaj dek jaroj donis por la metalurgio idealan material-ekzamenan instrumenton ne kaŭzanta rompdifekton. Efektiviĝis la plej aŭdacaj imagoj, ĉar ebligis rapida kaj nemultekosta — sur la tuta volumeno disetendiĝanta — ekzameno de produktoj. La ultrasena material-ekzame-